AMERIKA ESPERANTISTO — La Monata Bulteno de la Esperanto Asocio de Norda Amerika — The Monthly Bulletin of the Esperanto Association of North America — AMERICAN ESPERANTIST

Joseph R. Scherer, President
Los Angeles, California.
James F. Morton, Vice-President
Paterson, N. J.
Joseph Leahy, General Secretary
Centra Oficejo - 1517 H Street, N. W., Washington, D. C. - Central Office
VOLUME 49 No. 5 - 10¢ per copy - $ 1.00 per year - March 1936

MARK THE DATES ON YOUR CALENDAR - - - - DETROIT JULY FIRST SECOND and THIRD
1 9 3 6 - 29th ANNUAL CONGRESS E. A. N. A. - 1 9 3 6

# VORTOJ DE LA PREZIDANTO

SAMIDEANA SOLIDARECO: Antaŭ kelkaj semajnoj aperis en "Heroldo" grava alvoko al la tutmonda samideanaro. Mi volas redoni la kernon de la enhavo ĉar ĝi estas interesane nur por la legantoj de "Heroldo", sed ankaŭ por la cetera samideanaro.

Bojkotoj okazas de tempo al tempo kontraŭ landoj kies momenta politiko ne plaĉas al la resto de la mondo. Sed ĉu vi imagus ke eksterlandanoj bojkotus ankaŭ siajn fratojn kaj parencojn en tiu bojkotata lando? Kompreneble ne!

Persekutoj ofte okazis en la mondhistorio. En la antikva Romo oni martirigis la Kristanojn. Ĉu la aliaj Kristanoj en tiaj malfacilaj momentoj punis la samreligianojn en Romo per mallaŭdado kaj bojkotado? Kompreneble ne!

Oni povus mencii multajn similajn okazojn de Romo ĝis la nuntempo. Kiam hodiaŭ en iu lando kristanaj misiistoj suferas pro malpermesoj kaj persekutoj, la tuta samreligia mondo kunsimpatias kaj eĉ helpas per konsiderindaj mon-donacoj.

Sed en Esperantujo ŝajnas esti malsame. Kiam en iu lando la registaro malfaciligas la vivon de iu gento kaj malhelpas la funkciadon kaj progreson de la esperantista vivo per dekretoj, tuj komenciĝas boj kotado kontraŭ ĉio en tiu lando - - - eĉ kontraŭ la Esperantistoj.

Iu trofervora samideano skribis al mi jene: "Mi deziras nek aĉeti esperantajn librojn, nek aboni iujn esperantajn gazetojn el lando kie la registaro tenas glavon super la kapo de la redaktoro, kaj persekutas iun religion aŭ genton....."

Bona Dio! Kia stranga logiko!!?? Puni tiujn samideanajn fratojn kiuj jam sufiĉe suferas kaj devas silente barakti pro la malfavoraj kondiĉoj. Pli bone ni subtenu ilin. Jen ebleco por montri grandmezure nian samideanan solidarecon!

Kaj jen estas ankoraŭ ebleco por pruvi la samideanan amikecon speciala okazo (mi esperas ke la legantoj pardonos al mi ke mi mencias tian eblecon sur tiu ĉi paĝo):

Antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis peton de unu el la plej famaj Esperantistoj en Eŭropo. Li estas unu el la plej multe respektataj esperantistaj aŭtoroj en la tuta mondo. Dum mia mondvojaĝo mi estis dum tri tagoj la gasto ĉe lia plej gastama familio. Sed sen propra kulpo li apartenas al gento nun persekutata kaj do suferas ne nur li sed ankaŭ la plej bonkora patrino de lia karega fileto. Ambaŭ gepatroj ne vidas ian estontecon por la infano. Nun, tiu eminenta samideano estas preta vendi grandan parton de sia bela kaj valora esperanta biblioteko - por helpi al sia familio en malfacilega tempo. Se iu aŭ iuj usonaj samideanoj estas pretaj oferti $25. - aŭ $50. - aŭ eble $ 100. - por helpi al tiu inda samideano, kaj samtempe akiri al si valoran librokolekton, mi volonte donos al li la adreson de nia meritplena samideano. Poste ili povos interkonsenti kun la helpinda samideano pri la libroj sendotaj por la mono ofertata. Jen bona ebleco por bonhavaj samideanoj por montri tute specialan samideanan solidarecon.

Joseph R. Scherer

Se interesata skribu al 4474 W. Adams Blvd., Los Angeles, Calif.

# REPORT OF FINANCE COMMITTEE

(February 17, 1936)

## O L D D E B T F U N D

Another month and another substantial gain in the drive for debt reduction. Replies from 47% of our members bring the total up to $428.75. And our honor roll of States in which the canvass is complete grows too. This month we add NEW JERSEY to a list which already reads: Colorado, Iowa, Rhode Island, Arizona, Vermont, Delaware, and Georgia. A total of eight States, and by an odd coincidence there are exactly that many more in which the reply of one member would complete the canvass. Massachusetts though falling slightly short of a 100% rating, deserves honorable mention for having contributed nearly half of the present month's total.

Following is a list of the donations received from Jan. 16 to Feb. 17, 1936:

| | |
|---|---|
| CALIFORNIA, Anonymous, $15.00 | $ 15.00 |
| WASHINGTON, D.C., F.G.C., $2.00; L.E.W., $2.00; C.F., $1.00 | 5.00 |
| MASSACHUSETTS, R.G., $10.00; H.B.H., $10.00; E.O. $2.00; J.R.G., $2.00; Anonymous, $2.00; M.B., $1.00; M. L. $1.00; W.E.L.T., $2.00; G.W.L., $1.00 | 31.00 |
| MINNESOTA, F. S., $1.00 | 1.00 |
| NEW JERSEY, Anonymous, $1.00 | 1.00 |
| NEW YORK, E.B.B., $5.00; H.H., $1.00; R.D., $1.00 | 7.00 |
| TEXAS, K.A.S., $1.00; W.P., $1.00 | 2.00 |
| VIRGINIA, H.S.K., $1.00 | 1.00 |
| WISCONSIN, O.M., $10.00 | 10.00 |
| | $ 73.00 |
| Previously acknowledged. (Reports of Sept. 16, Oct. 15, Nov. 15, and Dec. 15, 1935, and Jan. 15, 1936) | 355.75 |
| Total to date | $ 428.75 |

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

NEW! EXCELLENT PROPAGANDA! "Esperanto for the Globe-Trotter" by Isabelle M. Horn. Ten copies postpaid 25 cents. Order direct from the author at San Juan Bautista, Calif.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

IS YOUR PRONUNCIATION CORRECT?

You can check it, and learn to pronounce Esperanto correctly, by means of the new

"H O M E - S T U D E N T" R E C O R D S

Recorded by Fred and Violet Wadham, who are among the best speakers of Esperanto in England.

A series of six records in an album, giving the pronunciation of most of the exercises in "The Esperanto Home Student.

These records are unbreakable, durable, and long-playing.

Price of the six records and the album, including, postage, exchange, import duty, and clearance........................................$3.60.
Price of the book "The Esperanto Home Student.......... .20.

American Esperanto Institute
556 State Street, Madison, Wis.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

IN DRAMATIZATIONS OF Famous People born in February, several times daily in Fox theatre, Washington, D. C. Mrs Clestel Lewis (Washington Esperanto Chapter) portrays the character of Susan B. Anthony. If you do not know Mrs. Lewis, look up one of Uncle Sam's Mother's Day stamps-and look at her.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

U.S.GOVERNMENT-In response to an invitation by the Austrian Government the United States Government will be represented at the Universal Congress of Esperantists to be held in Vienna, August 8th to 15th 1936. Selection has not yet been made.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

M A R K
T H E
D A T E S
O N Y O U R
C A L E N D A R

| 1936 | | | JULY | | | 1936 |
|---|---|---|---|---|---|---|
| SUN | MON | TUE | WED | THU | FRI | SAT |
| - | - | - | 1 | 2 | 3 | 4 |
| 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 |
| 12 | 13 | 14 | 15 | 16 | 17 | 18 |
| 19 | 20 | 21 | 22 | 23 | 24 | 25 |
| 26 | 27 | 28 | 29 | 30 | 31 | - |

D E T R O I T
J U L Y
1st - 2nd - 3rd
1 9 3 6
D E T R O I T

# 29 TH ANNUAL CONGRESS OF THE E.A.N.A.

Gesamideanoj:

Per ĉiu monato la Esperanto-Kongreso 1936 alproksimiĝas, kaj nun ni alvenas la stacion kie la kongresa komitato solvis definitajn problemojn. Hodiaŭ ni povas anonci la jenan: La kongresa komitato elektis kiel kongresejon la hotelon "Fort Shelby", unu el la plej grandaj, modernaj kaj komfortaj hoteloj de ĉi tiu urbego. Tio asekuras la plej bonajn servojn kaj kongres-faciligojn, kune kun la plej malaltaj prezoj por ĉambroj en Esperanto-historio. Nia ambicio estas fari ĉi tiun hotelon la Esperanto-hejmo 1936. Kvankam la kongres-kunvenoj estos la plej grava parto, la kongresanoj havos sufiĉe da tempo por vidi Detroit, la plej mirindan industrian centron de la mondo.

Ĉu vi jam vidis la grandajn fabrikejojn de Ford, kaj ĉu vi jam scias, ke ili konstruas tie aŭtomobilon dum 59 minutoj, dum la kongresanoj observos tion? Vi certe aŭdis pri la aliaj entreprenoj de Henry Ford, nome la domo de l' "foiro de progreso," lia originala industria muzeo, kaj "Greenfield Village." Ankoraŭ dum longa tempo vi rememoros ĉi tiun tagon, la 2-an de Julio. Krom tio vi havos okazon partopreni aliajn karavanojn, vizitante la diversajn partojn de Detroit kaj ĉirkaŭaĵo.

En konata maniero ni finos la oficialan kongreson per bankedo, pri tio vi diros poste ke ĝi estis unu el la "altlumoj" de la kongres-tagoj.

Ni jam ricevis nombron da proponoj montrantaj la intereson de Esperantistoj pri niaj aranĝoj. Ĉu vi havas ion pri tio? Ĉu vi estas talentulo muzika aŭ artista iamaniere kaj volus helpi al ni beligi kaj perfektigi la kongres-tagojn?

Adresu la sekretarion de la kongresa-komitato, s-ano <u>Erich Kavel</u>,
<u>7 6 0 9</u> <u>Nevada - Avenue,</u> - - <u>Detroit,</u> <u>Michigan.</u>

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

# AMERIKA ESPERANTO-AKADEMIO

Laborplano, Sekcio "Ekzamena Komitato."

1. -- <u>Laboro de la Komitato.</u> La Akademio donas al spertulo, kiu ĝin deziras, diplomon post serioza kaj severa ekzamenado flanke de ĉiuj anoj de ĉi tiu komitato.

Ĉi tiun ekzamenon povas preni nur tiuj kandidatoj, kiuj jam antaŭe pasis sukcesplene la prikapablecan ekzamenon de E.A.N.A. aŭ la ekzamenojn de iu alia landa societo aŭ instituto, aŭ de lernejo kiu donas diplomon; ĉar temas ĉi tie pri la <u>akademia</u> diplomo, do pri la plej grava kaj valora kiu estas akirebla.

La akademia ekzameno estu skriba, juĝota de almenaŭ du komitatanoj, kaj parola, juĝota de almenaŭ unu komitatano. -- La Kongreso havigos oportunan okazon por la parola ekzameno, aŭ loĝado en la sama urbo kie loĝas komitatano; sed se neniu kontakto estas eble inter la kandidato kaj komitatano, la Akademio povas elekti, pere de la Ekzamena Komitato aŭ de la prezidanto, anstataŭanton el la vico de kompetentaj kaj respondecaj Esperantistoj, kun kiu la kandidato povas pli facile kontakti.

Post sukcesplena ekzameno la kandidato ricevos, post rekomendo per la estro de la Ekzameno Komitato al la prezidanto de la Akademio, diplomon subskribitan de la estro de la Ekzamena Komitato, de la prezidanto de la Akademio, kaj de la sekretario-kasisto (aŭ help-sekretario.)

La sekretario aŭ help-sekretario starigos kaj konservos liston de ĉiuj personoj kiuj ricevis la akademian diplomon.

2. -- <u>Rekompenso</u>. La kandidato pagos antaŭ la ekzamenado unu dolaron al ĉiu ano de la Ekzamena Komitato, kaj se li sukcesis, li pagas unu dolaron al la Akademio por la diplomo. -- Se la parola ekzamenado necesigas vojaĝon de komitatano aŭ anstataŭanto, la kandidato pagos la vojaĝelspezojn. -- La Ekzamena Komitato, Edwin L. Clarke, Estro, Lehman Wendell, Karl Froding

*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

# NEXT ESPERANTO WORLD CONGRESS

All present indications warrant the expectation that the world congress in Vienna the 8th to the 15th of next August not only will be largely attended and very pleasurable, but will be of unusual importance "por la antaŭenpuŝo de nia movado."

The very favorable attitude of the Austrian government toward Esperanto has been abundantly shown in the past. That government has now invited the governments of all European countries, through regular ambassadors and general consuls, to participate in a series of lectures on "cultural and economic problems of central Europe," to form a part of the twelfth "Esperanto summer university," which is to be one feature of the twenty-eighth Esperanto Congress. The national representatives will be allowed to speak in their respective national languages, and their addresses will then immediately be translated into Esperanto.

Other features of the Vienna congress will be an international conference of women, conferences for blind Esperantists, conferences on introduction of Esperanto into schools, and other departmental gatherings.

Beside the congress proper and its affiliated features, several longer and shorter sightseeing tours through the mountains and cities of Austria, to occur before, during, and after the congress week, have been arranged in detail for those desiring to take advantage of such opportunities.

As early as the second week in January, 271 persons in 23 countries had already enrolled as members of the Esperanto congress. (The congress fees are reduced for those paying early. Any person who is planning to attend may address Amerika Esperantisto, 1517 "H" Street, N. W., Washington, D.C., for more detailed information.)
*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

RECOGNITION. Many countries, cities, tourist and other organizations issue Guide Books, Folders, etc., in Esperanto-many of them on very fine paper and splendidly illustrated, for distribution universally. These publications are very interesting as showing the increasing eagerness of Governments, Industry, Organizations, etc., to make use of a neutral means of communication with people of other lands.
*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

Several years ago (1930) the members of EANA were promised an American Esperanto Song Book. Our Poet-Laureate H.I.Keyes was given the task of producing. He did a splendid job of composing many original songs in Esperanto, and translating several from other languages into Esperanto-fitting all to familiar melodies. For various reasons they were never published. Brother Keyes recently furnished the central office with copies, which are so good that we decided that so much well applied effort and good material should not be wasted. So, in order that all present members of the EANA have something good to sing on all festive occasions, the April edition of "AE" will be almost entirely devoted to SONG. We extend to Samideano Keyes our heartfelt thanks, and congratulate the Esperantistaro on having such an accomplished cooperator in extending the progress of the Esperanto movement.

Of the <u>five ways</u> for using our Esperanto (talking, listening, reading, writing, singing,) the singing is by far the easiest. (Ĉu ne?) New recruits or even curiosity seekers, at the very first hour's session they may visit, find themselves able to join voices with others in Esperanto versions of familiar songs, -- with pleasure and a fair degree of understanding. And the most seasoned of Esperantists find that singing together adds a special delight to their social gatherings.

Extra copies will be available postpaid at 15 ¢ each, or 10 ¢ each in lots of five and over to one address.

---

The "Atesto pri Kapableco," for examinations given by EANA through its Examination Committee, has recently been earned by Conway Brawner, Jr., Alexandria Va.; by Hugh Shatford, Washington, D.C.; and by Ernest G. Dodge, Washington, D.C. Congratulations to the Esperanto Movement and the Examinees. Others interested in taking examinations address Prof. Edwin L. Clarke, Box 14, Winter Park, Florida.
*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

# THE JANUARY CROSSWORD PUZZLE

So much news from month to month is now crowding for admission to our pages that we shall not be able to offer any form of "contest" in every issue. But the clever crossword puzzle supplied by S-ano David R. Pock of Toronto, Canada, has evoked so much interest that we hope to be favored with another for some issue in the not distant future.

Four contestants were so near perfection that they must rank together as "first prize" winners: Gilbert Nickel of Middletown, Del. -- Carl E. Hurd of Seattle -- Miss Julia Regal of Chicago -- M.C.McConkey (together with young daughter Enid) of Detroit.

Also three others send solutions of high merit, entitling them to rank as "second prize" winners: G. Clayton of Galt, Ont. -- H.S.Boyd of Toronto -- John L. Kiplinger of Morgantown, W. Va.

Below is the key of correct answers.

HORIZONTALE: (1) Kanada; (5) jam; (8) skiadi; (13) sal; (14) esperantista; (17) aster; (18) asocio; (19) tatu; (21) de; (22) ke; (23) venu; (24) ino; (26) akvo; (29) kuko; (31) havi; (34) il; (35) od; (36) "en" or "el"; (37) advokato; (43) ekipitaj; (49) iometo; (50) eniro; (51) ekio; (52) po; (53) oreloj; (54) si; (55) nord.

VERTICALE: (1) kas; (2) alt; (5) jes; (6) aro; (7) mac; (8) stomakhelpo: (9) ki; (10) ist; (11) ata; (12) dat; (13) "sacerdota" or "sakristia"; (15)partikulo; (16) ni; (20) unuigis; (25) nu; (27) vi; (28) ol; (30) od; (32) ve; (33) "in" or "il"; (38) dio; (39) omo; (40) ker; (41) ate; (42) tol; (43) en; (44) kis; (45) iri; (46) teo; (47) akr; (48) jid.

We feel sure that many samideanoj beside the prize winners have profited from an intensive scanning of their "vortaroj" in connection with this word puzzle.

*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

Again that devoted little archer, and hunter of happiness, CUPID, has found Esperanto targets for his love darts. This time, the same arrow pierced the hearts of Miss Kate Plampin, of San Antonio, Texas, and Edward W. Pharo, Jr. of New York and Pennsylvania. Samideanoj who attended the New York Kongreso last summer will remember Miss Plampin as the lady so devoted to the Esperanto cause that she travelled from Texas to New York BY BUS. Little Cupid, always on the job, then led her into the wilds of Central New York--to SYRACUSE, where she met, and married that other well known Esperantist- Mr. Pharo. We join the whole Esperantaro in extending to them hearty congratulations. This is the second pair of Esperantists to be hit by Cupid this year--Mr. & Mrs. J. C. Kensinger, announced last month, being the other-'Ata boy Cupid! we welcome happiness, progress and increase in our ranks. When such glad tidings as above get noised about, we anticipate a GRAND RUSH for Esperanto by the matrimonially inclined. All right! come along-even if we have to hire an extra secretary to write out new membership cards.

*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

DEATH. From the "Austrian Esperantist": "Robert Kreuz (UEA) subite la 1.de februaro. Terura perdo por nia movado.". Ni funebras kun la familio kaj la Esperanto-Movado. Also from the "British Esperantist" comes the sad news of the passing on of John Merchant, Jan. 9. He was one of Esperanto's best known and hardest workers. Mourned for throughout the Esperanto World.

*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

KARDINALO INNITZER, de Aŭstrio, diris: "La Esperanto-Kongreso en Wien, kiu okazos en la venonta somero, signifos en la mondlingva movado denove paŝon antaŭen, paŝon pli proksime al la interpaciĝo de la popoloj kaj al la mondpaco-Estu ĝi benata kaj kronata de sukceso"

*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

NEW EMBLEMS. La Verda Steleto, La Signo de Internacia Kompreniĝo de Popolliganta ideo, La Magia Ŝlosilo al Homaj Koroj-Esperanto-Emblemo en Butontruo. Ĉiu Bona Esperantisto Fiere Ĝin Portus. Verda Stelo kun ora "E", kaj ora protekto, sur stelpunktoj. Elekto-Ŝraŭbo 40¢; Sava Pinglo 50¢.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

GRAVA AVIZO: TENDARO DE SKOLTA ESPERANTA LIGO. DUM JULIO 18 ĝis 29a

En aŭ apud Ipswich. Ĉefurbo de Suffolk. en orienta Anglujo. Nur 70 mejloj malproksime de London. England.

Ĉi tiu tendaro estas por ĉiuj skoltaj Esperantistaj, kaj skoltoj de multaj landoj kaj de multaj lingvoj ĉeestos. Ili parolos Esperanton; studos Esperanton, ludos Esperante, kaj ne nur ridas tiele.

Ni havas la oficialan permeson de S-ro Hubert Martin Direktoro de la Internacia Skolt-oficejo en London, dissendi tiun ĉi inviton al ĉiuj naciaj skoltasocioj.

Ne necesas diri al vi kiel bonegan tempon vi havos. Vi jam scias, se vi iam ĉeestis unu skoltantendaron! Se ne, tiam vi povas anticipi unu grandan surprizon, Mi diru! Nu, se vi povus iri tien, aŭ se vi scias pri iujn kiuj povus iri, aŭ se vi konas iujn kiuj iros, tiam kunparolu kun ili, aŭ donu al ni la nomojn kaj la adresojn de ili, tiel ke ni povas korespondi kun ili pri la afero. Aliĝ-kotizo estas nur unu angla ŝilingo, aŭ 30 cendoj Usona; Tendar-kotizoj estas unu angla funto,—Aŭ Usona kvin dolaroj. Tio enhavas nutradon por la tuta periodo, kontraŭ-akvajn ter-kovrilojn, tendajn kovrilaron, k.t.p. pagata tuj kiam vi alvenos.

Kiel pli bona povas vi ĝui vian someran libertempon?

Ne necesas oficiala avizo, aŭ "aliĝilo", sed vi devus sendi al ni plej frue, leteron ke vi volas iri.

Afable skribu tuj pri tio afero al S-ro Rev. JOHN H. FAZEL. Nacia Agento de la S.E. Lo, ĉe 1122 west 8th str. Topeka, Kansas. Petu informon, aŭ faru demandojn de li.

Tempo flugas. Rapidĝu vin. Estu preta.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

TOPEKA, Kan. - A new class of colored boy scouts ~~are~~ also organizing under leadership of "Big"Joe Thompson, Probation Officer, and Joe is a replica of Joe Louis when it comes to knowing how.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

At the regular monthly meeting (Topeka Esperanto Society), last month the Ogleby family put on a one act Playlet, called "The Naughty Girl", in which little 7 year old Geraldine took the star part. All of course, in Esperanto. It made a decided hit.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

One of the most fluent speakers of Esperanto in Topeka, Kan., is a blind girl (Miss Lovelia Hilty). She sings in that wonderful language also.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

Mr. Fazel has a National Klubo composed of over ONE THOUSAND young folks all over the U. S. A., pledged to learn the language Esperanto. He is American representative for the Skolta Esperantista Ligo (Esperanto Boy Scout League).

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

**La tutamerika esperantaro funebras kun nia kara frato, Doktoro Tobias Sigel, pro la morto de lia amata edzino, okazinta la 20-an de februaro 1936.**

**Ke ŝi ripozu pace.**

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

THE E A N A "Office Boy" from Central Office, was the guest of the New York Esperanto Society at their monthly meeting, February 1st in Hotel New Yorker. He told them something of the way the wheels turn around in the EANA machine-and a few other things.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

"La INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO" (oficiala organo de T.A.G.E.) ĵus eniris la 15an jaron de sia ekzistado. Ĉu vi komprenas la signifon de tio? Tio ja atestas, ke I.P.R. rajte ludas sian rolon en la esperana gazetaro. Ĉu ankaŭ por vi? Se ne, konitiĝu kun ĝi kaj petu tuj senpagan specimenon. P. Korte, Schoolstraat 13, VEENDAM, HOLLAND.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

"THE EUROPEAN HERALD", Weekly ($4.00), London, England, in English, French, Spanish, German and Italian - in 1934 included Esperanto-on trial. It is now giving a much larger amount of space to Esperanto than heretofore. An editorial says:-

"In promoting Esperanto to the front rank of our columns, we are not merely paying homage to one of the greatest steps ever taken towards international understanding on a world-wide scale. We are simply copying what every business man would do: concentrating on an obviously successful line. Esperantists all over Europe, and from far beyond, have rallied to our ranks, and have continued their support even in times of stress.

"And no spirit could be more welcome than theirs. They are practical idealists, their very study is the proof of their keenness and their sincerity, their horizon is the world.

"They are indeed allies of which anyone may be proud. Their unrivalled success, well-nigh unique as a vast international movement: their rapid spread and significance, growingly acknowledged in every country and every sphere; make them most valuable allies."

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

AL HELPEMULOJ. - F-ino Astrid Haugstrup-Sorensen, 30 Jellingvei, Veile, Danujo, deziras interrilati kun Esperantistoj, kiuj estas pretaj (1) Doni aŭ prunti malnovajn E-lernolibrojn al aliaj; (2) Sendi legitajn E-gazetojn, de tempo al tempo, aŭ regule, al interesitoj; (3) Interkorespondi pri kaj en Esperanto. Respondu al ŝi dirante kion oni povas fari, kaj aldonante detalojn pri lingvoscio, interesoj, profesio, k.s., kaj ŝi penos aranĝi por vi laboron. <u>Ne sendu gazetojn aŭ librojn al ŝi.</u>

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

PAINLESS ENROLLMENT - If a dollar and a half looks like too big an outlay all at once, drop a nickel, dime or quarter into a box, drawer, etc., a few times a week. You'll be surprised how soon, and easily you will have enough to renew or become a member of the E. A. N. A. Students pay 10¢ at each lesson and at the 15th they are full fledged members. <u>ALSO</u> - and this should be in VERY LARGE CAPITALS - <u>IN SAVING UP FOR THE DETROIT CONGRESS.</u> - Note the dates on first page of this issue.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

NEW ESPERANTO EMBLEMS - - Green Star with Golden "E" in center - a unique feature is the Golden Ball Protectors on star points - eliminating all danger of injury from that source. The emblems are of the same type as the expensive lodge and fraternal buttons selling for a dollar or more. The price we are offering them for is due to our desire to have the Green Star worn proudly by every Esperantist. - Choice of fastenings - Screwback 40¢ - Security pin 50¢. Order from Central Office E. A. N. A.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

Advertising rates for small announcements in "American Esperantist": Classified, 1¢ per word - minimum 25 words, Space, 1 x 3 1/2 inch, 50¢ - 3 insertions for $ 1.00, 1/2 page - $ 3.00, Full page, - $ 5.00 Send copy by the 20 th.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

The Esperanto Publishing Club,
Suite 615, - 119 West 57th Street, New York City
deziras anonci ke la nova muziko por la Himno Esperantista de Doktoro L. L. Zamanhof, estas nun aĉetebla ĉe la supredonita adreso. La prezo estas 30¢, Aldonu 5¢ por la poŝto.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

Al kiu volas belajn sigelmarkojn kaj sendos 1 respondkuponon mi tuj sendos 10 seriojn (1 serio konsistas el dek bildoj). La bildoj estas famaj vidaĵoj en Japanujo. S-ro Baba-Jasomacu, Toyama Yubinkyoku, Japan.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

EVERY ESPERANTIST SHOULD BE IN THE E. A. N. A. AND BRING IN A NEW MEMBER

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

SE VI ESTAS AMIKO de E.A.N.A. kaj U.E.A. PAGU TUJ VIAN KOTIZON

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X
Esperanto Association of North America 1517 H Street, N. W., Washington, D.C.

MEMBERSHIP RATES - FIXED AT 28th CONGRESS

Class I - Membership in EANA and U E A, with "Amerika Esperantisto" . . . . . $1.50
Class II - Above combination & Jarlibro (a directory of World Esperanto) added 2.75
Class III - Above combinations & the monthly magazine "Esperanto" ($1.75) added 4.50
Come in any time - Your year begins the date of your receipt, (instead of October 1st as formerly) (EANA with "AE" $1.50) (Jarlibro, additional $1.25 ("Esperanto", additional $1.75) (Total $ 4.50). Subscription to "American Esperantist" one year $1.00
X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

TEXTBOOKS Dr. Reed's "Practical Grammar" - A course suitable for all grades 75¢
Prof. Kenngott's "Esperanto Course" speaks for itself - and teaches you. $ 1.00
(The authors of both above courses are recognized as World Authorities on the language
Prof. Kenngott's Pocket Dictionary - Two-way. A worthy companion to any course 25¢
Froding's "Easy Course in Esperanto" - a splendid 'starter' of 8 lessons. 10¢
Sussmuth's "American Esperanto Key" - alphabet, grammar & vocabulary 5¢
"Edinburgh Dictionary" Esperanto-English, English-Esperanto 288 pp. 4 x 6 $ 1.00

| | |
|---|---|
| Esperanto-English by E. A. Millidge. The BEST Esperanto Dictionary in any National Language. 500 pp. Price $2.75 | English-Esperanto by Joseph Rhodes a useful companion to the Millidge. Post-paid - - - $1.10 (547 pp) |

Easy - and interesting reading: "Fabloj de Ezopo" 25¢, "Zamenhofa Legolibro" 50¢ "Esperanto for the Globe-Trotter" two for 5¢, "Sub la Meznokta Suno" 25¢, "Sep Ridoj" 25¢, Ĉiutaga Vivo (Kenngott) 25¢, "Facilaj Esperantaj Legaĵoj" 50¢.
X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

"A Picture is worth 1000 Words" Postage Stamp Type (and size) Photographs, gummed ready to stick, from any picture. 100 for $1.00, 500 for $4.00, 1000 for $7.00. Original returned unharmed. Used on birthday, Gift, Graduating and all kinds of greeting Cards. Jos. Leahy, 1517 H Street, N. W., Washington, D. C.
X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

SAVE ON MAGAZINE SUBSCRIPTIONS - Club and Special Rates. Any offer matched. Any Magazine, Any Time, Any Where. New or Renewals. Send for list and save money.
X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

PHOTOGRAPHS OF DR. ZAMENHOF 5x7 25¢ 5 for $1.00 8 x 10 65¢. Postage Stamp Size, 12-15¢
X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

JOSEPH R. SCHERER, author, lecturer and world traveller, saw and photographed the unusual, in almost fifty lands, tells about it in "Ĉirkaŭ la Mondon kun la Verda Stelo", cloth $2.25, Paper, $1.60 - plus postage, 15¢.
X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

Advertising rates for small announcements in "American Esperantist": Classified, 1¢ per word - minimum 25 words. Space, 1 x 3 1/2 inch, 50¢ - 3 insertions for $ 1.00, 1/2 page $3.00, Full page, $5.00. Send copy by the 20th.
X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

ORDER ANYTHING ON THIS PAGE FROM E.A.N.A. - 1517 H Street, N. W., Washington, D. C.
X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

Kopioj de "Amerika Esperantisto" estos sendataj al kiu ajn adreso de Usono aŭ eksterlando kontraŭ sendo de neuzitaj usonaj poŝtmarkoj por 10 cendoj.
X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

The sympathy of all American Esperantists goes out 'Our Grand Old Man of Esperanto' Dr. Tobias Sigel, Detroit, Mich. in the loss of his beloved wife who passed away on February 20th, 1936.
X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

Esperanto classes are held two nights a week-Wednesday and Friday evenings 7:30 in the United States Capitol. All are welcome.
X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

EVERY ESPERANTIST SHOULD BE A MEMBER OF THE E.A.N.A. - & BRING IN A NEW MEMBER

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X